

# MILÍČ EL KROMĚŘÍŽ

(Okaze de la 700a datreveno de moravia reformisto de romkatolika eklezio.)



Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 5an de marto 2025

Ĉiuj scias nomon de Magistro Johano Hus, sed nur malmultaj scias liajn antaŭulojn. Unu el antaŭuloj de Hus estis **Milíč el Kroměříž** (oni iam aldonas la nomon Johano, sed mankas historiaj atestoj, ĉu vere li tiun nomon uzadis).

Milíč estis moraviano. Li naskiĝis en moravia vilaĝo Tečovice inter la jaroj 1320-1325. Pri lia infanaĝo ni scias nenion, verŝajne li akiris sian bazan klercon en urbo Kroměříž. Li studis en Karola Universitato en Prago kaj fariĝis reĝa oficisto (notario). En la jaro 1358 oni lin unuafoje menciis.

La 14a jarcento en niaj landoj estis tempo de gotiko. Tio ankaŭ estis tempo de kavalira kulturo. Nia reĝo Johano Luksemburga estis vera kavaliro, kies slogano estis „Mi servas“ („Ich diene“). En la jaro 1346 blinda Johano Luksemburga, kiel batalanto de franca armeo, falis en batalo apud Crécy-en-Ponthieu, kiu estis unu el bataloj de Centjara Milito inter Grandbritio kaj Francio (1337 – 1453).

Ankaŭ lia filo Karolo estis kavaliro. Ekde infanaĝo la kavaliro estis preparita por bataloj. La kavaliroj estis kruelaj, sed samtempe grandanimaj. Plimulto el ili sciis nek skribi nek legi, sed ili kreis propranaturan kavaliran kulturon. Knabo, kiu volis fariĝi kavaliro servis al iu kavaliro kiel varleto, poste lin reĝo aŭ alia kavaliro la varleton armigis kavaliro. Juna Karolo partoprenis en bataloj kontraŭ italaj ŝtatoj, poste li estis moravia margrafo. Oni lin edukis en Francio, pro tio li parolis francan kaj estis bone preparita por regado.

En la jaro 1347 li fariĝis nia reĝo. Danke al li povis en Prago labori arĥitektoj Peter Parler kaj Matiaso el Arras. Karolo la 4a havis kontaktojn kun la papo Kliment la 6a, humanisto Francesco Petrarca kaj alia tiamaj elstaruloj. En vejnoj de Karolo la 4a cirkulis ankaŭ ĉeĥa sango, ĉar lia patrino estis ĉeĥino Elizabeto Primislidino.

En la plej signifa dokumento Ora Buleo (valida en la jaroj 1356 – 1806), kiu regulas rilatojn inter princoj-elektistoj dum elekto de roma reĝo, Karolo la 4a donas avantaĝojn al ĉeĥoj, eĉ la postulon, ke filoj de princoj-elektistoj lernu kvar lingvojn: latinan, germanan, italan kaj ĉeĥan.

Ekde la jaro 1307 papoj de romkatolika eklezio rezidis en Avinjono (ĝis la jaro 1377).

Milíč povis vivi kiel imperiestra oficisto. Sed lin influis opinioj de sankta Francisko el Assisi, pro tio en la jaro 1361 li pastrigis kaj fariĝis kanoniko en metropolita praga preĝejo.

Danke al Karolo la 4a lia kariero kontinuus kaj baldaŭ li estis ĉefdiakono. Li observis deklivon de tiama romkatolika eklezio. Dum jarcentoj la eklezio frapante malproksimiĝis de idealoj de la unuaj kristanoj. Deviga celibato ekzistis (ekde la jaro 1143), sed por kelkaj pastroj tio ne estis problemo, ili havis konkubinojn, vizitis malĉastulejojn, ludis riskemajn ludojn kaj drinkis. En la 14a jarcento kredantoj devis por ĉiu eklezia faro pagi: monon por bapto, konfesoj, indulgencoj, geedziĝo, viatikoj, sepultoj. Ekde lulilo ĝis ĉerko la kredanton akompanis etendita mano de pastro aŭ monaĥo. Multe da homoj je eklezio parazitis.

Riĉuloj povis aĉeti ekleziajn rangojn rekte en Romo. Ofte ili havis kelkajn prebendojn kaj ilian veran laboron faris anstataŭantoj.

(Bela ekzemplo de multprebendisto el la 15a jarcento estis Zbyněk Zajíc el Házmburk, kiu eklernis legi nur kiel ĉefepiskopo. Pro tio husanoj lin mokis: „episkopo Zajíc la Alfabeto“.)

Tiu multprebendeco al Milíč ne plaĉis.

En la jaro 1363 en Pragon alvenis aŭstra aŭgustiniano Konrad Waldhauser, kiun invitis Karolo la 4a. Waldhauser predikis en latina kaj germana lingvoj en preĝejo de sankta Galo, Týn-templo, kaj ankaŭ sur foiroplaco. Liaj prelegoj Milíčon influis.

En la jaro 1363 Milíč rezignis sian oficistan karieron kaj translokiĝis en vilaĝon Horšovský Týn (sudokcidenta Bohemio). Post reveno en Pragon (1364) li ekpredikis en preĝejo de Sankta Nikolao (na Malé Straně), en preĝejo de Sankta Edigio en Malnova Urbo. Praganoj lin mokis, ĉar li predikis en hanaka dialekto kaj iam forgesis anonci ekleziajn festojn. Sed Milíč pliperfektigis, fervore mallaŭdis malhumilecon, diboĉadon kaj avarecon.

### **Sed rebonigon de tiama socio li unue komencis kiel rebonigon de sin mem.**

Li predikis dufoje eĉ plurfoje dum la tago, latine por studentoj kaj pastroj. Kolekto de liaj predikoj „*Abortivus*“ (Antaŭtempe Naskitaj) fariĝis helpilo por predikantoj. Li ellernis germanan lingvon tiel perfekte, ke kapablis germane prediki. Predikante latine, ĉefe kaj germane Milíč kritikis moralan deklivon de eklezio, uzuron, luksan vivon de riĉuloj, almozajn monaĥajn ordenojn kaj multprebendismon.

Dufoje li predikis en sinodoj. Se li ricevis donacojn, li ilin disdonis. Li vivis kiel malriĉulo kaj asketo. Nuntempaj homoj ne komprenas ideon de asketismo. Certe ne estus plezuro por ni vivi kune kun Milíč, kiu ne lavis sin kaj dormis en la sama vestaĵo, kiun portis dum tuta tago. Eĉ proksimuloj volis al li helpi, sed Milíč ne volis, por ke iu lavu lian vestaĵon. Oni devis lin trompi kaj poste partojn de lia vestaĵo rapide lavi,

Lia lernanto Mateo el Janov pri li skribis:

„Kaj kiu ne miregus pri granda dokteco de Milíč?

Pro tio, ke antaŭe li estis nura pastro kaj skribisto en princaj kortoj, sed kvankam tio spirito de Jesuo lin tiel efike vizitis, ke li tiel multe saĝiĝis, ke por li estas facila prediki kvinfoje dum unu tago, nome unufoje latine, unufoje germane kaj trifoje ĉeĥlingve, publike antaŭ homamaso, sonplene kaj kun efika fervoreco.”

El Reguloj de Malnova kaj Nova Testamentoj.

Almozmonaĥoj lin malamis. Ankaŭ pragaj pastroj plendis: „Ekde via alveno ni havas problemojn.“ Pro tio li Milíč por iu tempo ĉesis siajn predikadojn, sed en monaĥejo li ne sukcesis trovi trankvilecon.

Sinofere ma laciga laboro kaj vivo en malriĉeco signife influis psiĥikan stato de la predikanto.

Kiel multaj aliaj kristanoj Milíč kredis, ke alvenos fino de la mondo. Laŭ lia kalkulado Antikristo povis alveni en la jaroj 1365 – 1367.

Armeo de Karolo la 4a iras el Francio en Germanion! Tio certe estas la armeo de Antikristo!

Pro tio predikanto Milíč en ekstazo publike laŭte diras al romia imperiestro kaj bohemia reĝo Karolo la 4a: „Vi estas Antikristo!“ Tiu ago ne povis resti nepunita. Ĉefepiskopo Johano Očko el Vlaŝim la predikanton malliberigis. Kiam en malliberejo Milíč trankviliĝis, Karolo la 4a sciante la proverbon „Aglo muŝojn ne kaptas“ lin liberigis.

En la jaro 1367 Milíč foriris en Romon. Tie li atendis revenon de la papo Urban la 5a el Avinjono, sed la papo longtempe ne estis alvenanta. Pro tio Milíč volis iri al la papo en Avinjonon.

En fino de majo 1367 antaŭ sia planita foriro li anoncis, ke volas prediki pri Antikristo. Roma inkvizitoro ne volis havi problemojn kaj preventive Milíčon malliberigis. Oktobre 1367 Urban la 5a revenis el Avinjono en Romon. Danke al kardinalo Angel de Grimaud oni Milíčon liberigis. Milíč revenis en Pragon.

Almozmonaĥoj lin akuzis, sed Milíč sin defendis. Li skribis du leterojn al papo volante lin konvinki, ke ekleziaj reformoj estas necesaj.

Li eldonis „Librojn pri Antikristo“ („Knížky o Antikristovi“).

Milíč ne batalis kontraŭ eklezio, nur volis reformojn. **Sed tio estis tasko pli granda ol liaj fortoj.**

Denove li iris al papo en Romon, sed vane.

En la jaro 1369 Konrad Waldhauser forpasis

Milíč dediĉis siajn fortojn al siaj multaj lernantoj. Li por ili eldonis verkaĵojn *Gratiae Dei* (Diaj Gracoj) – eksplikojn de ĉiuj evangelioj, *Angelus* (Anĝelo) – vortaron de bibliaj terminoj, kaj preĝojn en ĉeĥa kaj germana lingvoj.

En la jaro 1372 Milíč helpis al multaj pragaj malĉastulinoj, kiuj volis vivi honeste. Milíč por ili aranĝis loĝejo en domo de virgulino Katarina el Moravio. Iuj malĉastulinoj revenis hejme al siaj gepatroj, aliaj edziniĝis, aliaj fariĝis servistinoj. Posedantino de la plej granda malĉastulejo ekpentoŝaris kaj antaŭ sia morto dediĉis sian domon al Milíč. Danke al subteno de la imperiestro Milíč povis krei komunumon Jerusalemo. Tie estis kapelo, domo por virinoj kaj domo por venontaj pastroj. Milíč, kiu estis malriĉa, devis zorgi pri 200 – 300 homoj. Liaj malamikoj Jerusalemon malŝatis. Lia sukcesa laboro estis estimata, sed post lia morto la komunumo disfalis kaj konstruaĵojn akiris cistercianoj.

Humanisto Přemysl Pitter, kiu Milíč-on tre admiris, en la jaro 1933 en Prago konstruis Doman Milíč por infanoj el malriĉaj familioj.

En la jaro 1373 kontinuus konfliktoj inter pragaj pastroj kaj Milíč. Dětlev Stromer, kanoniko de Sankta Vito, procesis kontraŭ Milíč, kiu devis forlasi sian kapelon. Denove la pastroj akuzis Milíčon kaj volis la Jerusalemon neniigi.

Milíč petis helpon de la papo Gregoro la 11a.

Nova papo, kiu Milíč-on ankoraŭ ne sciis, ordonis ekzaminadon de la afero kaj punon de Milíč. Pro tio en marto 1374 Milíč alvenis en Avinjonon. Kardinalo Grimaud denove lin defendis. Eĉ Magistro Johano Klonkoth, kiu loĝis en Avinjono kaj havis taskon Milíčon akuzi, proklamis, ke li

mem ne vidas iun malbonon de Milíč. Anstataŭ puno oni senkulpigitan Milíčon petis prediki, la kardinalo lin gastigis.

La 1an de aŭgusto 1374 en Avinjono Milíč el Kroměčíz forpasis.

En tiu tempo en sudbohemia vilaĝo Husinec ludis kun aliaj infanoj malgranda, ĉirkaŭ trijara knabo. Johano Hus.

## Rekomendita literaturo

- KAŇÁK, M. & ČERVENÝ, K. 1975: Milíč z Kroměříže. 1a eld., Prago, Blahoslav, 147 paĝoj.
- KAROLO LA 4A 1995: Karolo la IVa. La propra biografio. 1a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 88 paĝoj.
- KOPECKÝ, M. 1999: Jan Milíč z Kroměříže a Jan z Jenštejna. 1a eld., Žďár nad Sázavou, Cisterciána Sarensis, 96 paĝoj.
- LESNÝ, I. 1984: Zpráva o nemocech mocných. Významné historické postavy očima neurologa. 1a eld., Prago, Horizont, 256 paĝoj.
- MAREČKOVÁ, D. 1958: T. zv. Milíčův Angelus. Listy filologické, 6: 194-203.
- MILIČ Z KROMĚŘÍŽE 1948: Poslání papeži Urbanu V. Spisek o Antikristovi. 1a eld., Prago, Blahoslavova společnost, 29 paĝoj.
- ODLOŽILÍK, O. 1924: Jan Milíč z Kroměříže. 1a eld., Kroměříž, Kostnická Jednota v Kroměříži, 28 paĝoj.
- PITTER, P. 1995: Duchovní revoluce v srdci Evropy. Pohled do dějin českého národa. 2a eld., Prago, Kalich, 131 paĝoj.
- PITTER, P. 2017: Spirita revolucio en la koro de Eŭropo. Rigardo en la historion de ĉeĥa nacio. 1a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 127 paĝoj.

## Personaĵoj

**de Grimaud, Angel** – 1315-1320? – 1388

**de Rosières, Pierre** – 1291 – 1352 (ekde la jaro 1342 papo Kliment la 6a)

**Elizabeta Primislidino** – 1292 – 1330

**Hus, Johano** – 1371? – 1415

**Johano Luksemburga la Blinda** – 1296 – 1346

**Johano Očko el Vlašim** – ? – 1380

**Karolo la 4a Luksemburga** – 1316 – 1378

**Mateo el Janov** – 1350-1355? – 1393

**Matiaso el Arras** – 1290 – 1352

**Parler, Peter** – 1332-1333? – 1399

**Petrarca, Francesco** – 1304 – 1374

**Pitter, Přemysl** – 1895 – 1976

**Waldhauser, Konrad** 1320-1326? – 1369

**Zbyněk Zajíc el Házmburk** (kromnomata episkopo Zajíc la Alfabeto) – 1376 – 1411.